- 4 -01- 1991

# Informilo

Monata revuo - Maandelijks tijdschrift - 10a j. n-ro 9, dec. 1990

## Estraro

*Prezidanto:* vakas.

*Sekretario:* Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem. Tlf. (03) 440 30 92.

*Financoj:* Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge. Tlf. (050) 33 00 04.

*Instruado:* Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem. Tlf. (03) 239 21 69.

*Eksteraj rilatoj:* Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen. Tlf. (011) 52 19 43.

## Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

*Eldona agado:* Chris Declerck, Gerrit Berveling, Rejna de Jong, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.

*Manlibro de la aktivulo:* Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee. Tlf. (016) 20 14 53.

*Gazetara servo:* Guido van Damme, p/a FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Tlf. (03) 234 34 00.

*Rebata servo:* Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende. Tlf. (059) 70 87 00.

*Prelegvojaĝoj:* Hilde van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst. Tlf. (053) 70 50 11.

# FEL-estraro: protokolo

8a de decembro 1990

## 1. FINANCOJ

Ĉeestas: Roland Rotsaert kaj Ivo Durwael. Paul Peeraerts estas malhelpata pro familiaj kialoj.

1.1 SPEZOKONTO: la spezoj pliboniĝis en la lastaj monatoj. La enspezoj pro libroservo, -eldonado kaj pro Monato konsiderinde kreskis ĉi jare. Oni ankoraŭ ne trovis sufiĉan kompenson pro la malapero de laboroj por UEA. La risko je - malgranda - deficito ankoraŭ ekzistas.

1.2 ELDONA AGADO: la poemaro de Emile Van Damme estas preta kaj prezentiĝos al la publiko dum la Zamenhof-festo en Bruselo. Por la ceteraj planoj vi rigardu la liston de la novembra protokolo. La eldona agado do certe estos vigla ankaŭ en 1991.

1.3 PLANADO: Pieter Vets, la konscienc-kontestanto en la centro, trastudas librojn pri aplikado de merkatadprincipoj en ascocio. En 1991, li ellaboros novan agadplanon por FEL, en kunlaboro kun Marc Vanden Bempt kaj Bert Vanhoven.

1.4 LIFTO: ekde aprilo 1991 validos nova leĝo pri liftoj. Prezoferto por minimumaj adaptoj estas 430 000 fr. FEL interkonsentis kun Institucio Hodler, ke ĝi pagos ĉiujn elspezojn por konservi la domon en bona stato. Sed adapto aŭ nuligo de la lifto estas esenca ŝanĝiĝo. Tial ni petos al IH por fari la necesan demandon kaj pagi la kostojn.

1.5 LIBROSERVO: ĉiuj libroj, eldonitaj antaŭ 1986, escepte de 1, rehavigis la investitan kapitalon. Tamen restas grandaj stokoj da tiuj libroj. ID proponas uzi ilin i.a. por promocii la abonadon al Monato.

1.6 ASEKURO PRI CIVILA RESPONDECO: mankas la informoj pri la polisoj de FEL kaj LVS. Jan Bovendeerd konsildonos por eviti du poliscjn pri la sama risko.



## 2 ADMINISTRA PARTO

Ĉeestas: RR, ID, Jos Vandebergh kaj Alex Humet.

2.1 ANTAŬA PROTOKOLO: JV klarigas, ke la vortoj "esprimo de malfido" (2.2) ne redonas lian intencon. La (neprotokolita) foriro de PP dum la diskuto pri reciklita papero pruvas miskomprenon. Kiel oficisto de la komunumo Houthalen, ankaŭ JV respondecas pri (komunuma) preseja. JV esperas nur ke nia centro profitu de liaj spertoj. Apud asertoj kaj onidiroj oni devas kompari faktojn, pruvi la asertojn ... ne pro malfido sed por povi pliboniĝi la funkcion de la centro. Necesas por tio kiom eble plej multe da informoj. La fakto, ke li ne sciis pri la dungo de nova presisto estis nur ekzemplo por ilustri ĝian mankon.
JV ankaŭ substrekas ke li estas la nura estrarano, kiu samtempe reprezentas 4 klubojn. Se li ekzemple plendis pri 3 eraroj en 6 linioj en la informoj de E° Pan° pri Limburg, li jam ricevis la plendojn de minimume 3 kolegoj.

2.2 EKSIGO PREZIDANTO: Monique Caestecker komunikis al ID, ke ŝi rezignas pri la prezidanteco. Car en la nuna estraro ne estas vic-prezidanto, la estraranoj decidas funkcii sen prezidanto ĝis la venonta jarkunsido.

2.3 ESPERANTO PANORAMA: en la centro, oni ellaboris kelkajn skizojn por nova titolpaĝo kun nova titolo. La plej taŭga titolo, pro la enhavo kaj pro la vortludo, estas "HORIZONtaal". Bedaŭrinde, tiu vorto estas la titolo de raporto pri la instruado de fremdlingvoj en Nederlando kaj sekve povus kaŭzi konfuzigon ĉe Nederlandanoj. Finfine la estraro komisias al ID ree kontakti S-inon Erasmus kaj sekve elekti ĉu "Horizontaal", ĉu "Panorama".

2.4 PERLETERA VARBADO: la varbleteroj por Monato daŭre alportas bonegajn rezultojn. En la komenco de 1991 Pieter Vets preparos novan varbkampanjon por la kurso Esperanto-Programita.

2.5 RILATOJ MEMBROJ/ESPERANTO CENTRO: la estraro

konstatas, ke la Esperanto-centro restas tro fremda por la membroj. Multaj membroj tute ne konscias pri la rolo, la problemoj, la eblecoj kaj neeblecoj de la centro. Kelkfoje membroj jam mendis ion ĉe la centro kaj poste plendis pri la alta prezo.

La diferenco plej ofte troviĝas en la fakto, ke oni mendas presaĵon ĉe loka presisto kaj mem faras grandan parton de la laboroj, kiel tajpado de tekstoj per komputero, faldado, krampado, enkovertigo, adresado ktp. Se loka grupo mendas ion en la centro, tiujn rutinajn laborojn devas fari pagitaj oficistoj. Tial la centro senpage disponigas sian infrastrukturon al volontuloj de lokaj grupoj. Ekzemple se grupo mendas la presadon de broŝuro kelkaj volontuloj povos uzi kolekto-, tranĉ-, krampmaŝinon ktp por mem fini la laboron. Kompreneble necesas antaŭa informo de Paul Peeraerts.

2.6 INFORMA TORNISTRO: en Nederlando, oni preparis ujon kun ĉiuj dokumentoj por informaj prelegoj. Ĉu ankaŭ FEL preparu ion tian? La nombro de informaj prelegoj estas tro malgrandaj por dediĉi tempon al tio. Krome ni supozas, ke prelegantoj preferas uzi siajn proprajn tekston kaj materialon.

2.7 ESPERANTO LIBROJ EN BIBLIOTEKOJ: Marie Grela lanĉis kampanjon por ke kiom eble multe da valonaj bibliotekoj aĉetu minimume lernolibron kaj vortaron. Tio eblas nur per la kunlaboro de lokaj klientoj de la koncerna biblioteko. Dekoj jam favore reagis.

En Flandrio, multaj bibliotekoj havas jam Esperanto-librojn dank'al la iniciato de lokaj kluboj. Sed pro la sukceso en Valonio, ni proponas ke ĉiu loka klubo ankaŭ esploru pliajn eblecojn. JV konsilas prepari la terenon per kontakto de la skabeno pri kulturo, de la bibliotekisto aŭ de oficisto (ĝis certa sumo, bibliotekistoj rajtas memstare decidi pri aĉetoj).

2.8 KONSCIENC-KONTESTANTO: Pieter Vets dejoros en la centro ĝis julio. Se la militservo malpliilongiĝos, ankaŭ lia dejorperiodo malpliiĝos. Sed li nun jam mem serĉas personon, kiu volas daŭrigi lian servon.



2.9 DIVERSAĴOJ:

EKSPOZICIO DE POŜKARTOJ: En Hennebont oni faris ekspozicion de poŝtkartoj el 17 landoj. Ĝi faras rondvojaĝon kaj iam alvenos ĉe ID. Je ĝia alveno, ni ekzamenos ĉu eblas publike montri ĝin.

REUZPAPERO: pere de KEF RR petis informojn en Germanio. La prezoj, kiujn li ricevis estas kompareblaj kun tiuj, kiuj aperis en la antaŭa Informilo. La akiro de reuzpapero iam estis problema en Germanio, sed nun ne plu. Ĉe Bosch oni uzas reuzpareronpor internaj dokumentoj kaj blankan por ekstera uzo.

TAGO POR INSTRUISTOJ: AH planas okazigi ĝin je 23.02.91. La temoj estos: Esperanto en la praktiko, Lingvaj Demandoj kaj Taŭgaj Respondoj al Tiklaj Demandoj. Ĉiu de FEL agnoskita instruisto ricevos personan invitleteron.

RILATOJ KUN AZIO: So Gilsu, estrarano pri Azia agado, petas nian kunlaboron por 3 planoj: sendo de Eŭropano kiel vaganta preleganto kaj instruanto en Azio (kp Joachim Werdin); sendo de Eŭropano al Azio por fondo de pedagogia centro; akcepto de Aziano por spertiĝi en Eŭropo. Ni respondos, ke ni volonte akceptos Azianon okaze de planata restado en Rotterdam por konatiĝi kun la centro en Antwerpen kaj kun kursoj kaj kluboj en Flandrio kaj ke ni gastigos tiun dum la necesa tempo.

BONA ESPERO: Ursula Grattapaglia dankas pro la sendo de pakaĵoj kun vestaĵoj de el la centro.

ESPEUROP: JV scivolas pri la funkcio de la kampanjo, pri la reago al ricevitaj informpetoj ktp, sed neniu havas respondon.

PROJEKTO "KOMUNIKADO EN EŬROPO": Hans Erasmus, Edward Symoens kaj Grégoire Maertens daŭre poluras la projekton. Post la propono pri la uzo de la angla en universitatoj, Nederlandanoj subite fariĝis pli konsciaj pri la minaco por la propra lingvo. En Kongreso de "Genootschap Onze Taal" kun mil eminentaj partoprenantoj, Hans Erasmus klarigis pri supre menciita projekto. Sekve triono de la ĉeestantoj

André sciigas ke laŭ Jean Pierre la statutŝanĝiĝo aperis en la ŝtata gazeto.
En la skolta kurso partoprenis 5 homoj. Unu jam trovis sian vojon al la genta grupo. Oni klopodos informiĝi ĉu denove okazos Esperanto-tendaro en la korea ĵamboreo '91.

Laŭ BEF FLEJA havigas 36 membrojn al TEJO anstataŭ la veraj pli ol 100. Tiu ĉi konfuzo estiĝis pro nedetala FEL-fakturo al BEF. Jean Pierre estos petata ĝustigi tion ĉi por '91.
La brusela grupo tradukis "La japanan ŝtonhakiston" el "Max Havelaar" de Multatuli. Ili fariĝis en Genk vidbendon kun teksto kaj diapozitivojn kun sonbendo. Eble taŭgas por klubkunvenoj.

5. Estontaj okazaĵoj
IS: André, Peter, Pieter Vets, Eddy kaj Ela partoprenos.
Skisemajnfino: An, Peter, André, Eddy kaj Ela emas.
Tago de internacia amikeco en Oostende: eble tiam povos okazi la jarkunveno de FLEJA. Definitiva decido sekvos.
IJF: restas espero akiri subvencion por 2 flandroj. André atendas pliajn informojn. Peter kaj André interesiĝetas partopreni.
IJK/UK: la busvojaĝo ne okazos.

Kiu kion ?
Eddy:
- petas konfirmon al UEA pri transigo de FLEJA-mono,
- ree petas al Iwona ĝiri la interŝanĝan labormonon al nia konto,
Desirée:
- esploras pri la kuirado dum FLEJA-semajnfino junia,
Patrick:
- demandas pri adreslibretoj de Pasporta Servo,
Jean Pierre:
- transdonos la ĝustan FLEJA-membronombron al BEF en januaro.

Protokolanto: Stefaan Cottenier



*La interhomaj rilatoj en FEL*

## SPARI ENERGION

Pli kaj pli mi konvinkiĝas ke la celo de nia vivo estas disvolvi niajn dotojn. Mi kredas je la biblia rakonto, ke ni ricevis talentojn kaj tiu, kiu bone mastras ilin duobligas ilin en la daŭro de la vivo. Por disvolvi niajn talentojn, ni bezonas aliajn homojn kun multe da mankoj. Sole, enpense, ni povas solvi multajn problemojn, sed nur la ĉiutaga vivo pruvas nian realan kompetenton. La Esperanto-movado havigas al ni belajn eblecojn por disvolvi niajn talentojn. Ne nur pro la fakto, ke ni facile parolas kun homoj de aliaj kulturoj, tial relativigas la valoron de propraj kutimoj kaj tradicioj, sed ankaŭ kaj precipe pro la multaj mankoj en movado, kiu pro ĝia unika diverseco estas ankaŭ malfacile bridebla. Persono, kiu volas aktivi en la Esperanto-movado akceptas la grandan defion por labori en medio de homoj tiom variaj, individuismemaj, ke kunlaboro ege malfacilas. Tio kelkfoje kaŭzas ĉagrenon, malkontenton kaj eĉ koleron. Sed ni pripensu, ke kolero estas granda malŝparo de energio, kiu plej ofte ne solvas ion, sed jes forpelas laboremulojn. Pripensu krome, ke frustracio estas ofte nur la esprimo, ke la propraj deziroj kaj atendoj ne efektiviĝis kaj do fakte estas seniluziiĝo pro malkovro de propra eraro. De nova kursano, ni ne atendas, ke li tuj akceptu taskon. Sed al homo samaĝa kaj samkapabla, , kiu jam faras multon, oni facile riproĉas, ke li neglektis parton de sia tasko. La malkontento do estiĝas pro la fakto, ke nia imago pri tio kion iu devas fari fuŝiĝis. Nur se ni atentu tiujn ĉi konsiderojn, ni povos plibonigi la multegajn lamojn en la Esperanto-movado.

Miaj pensoj nun iras al nia Esperanto-centro. Ĝi estas rimarkinda. Nur du oficistoj faras kion ili ankaŭ studis. La faritaj laboroj estas gradiozaj kompare kun tio kion oni faras en aliaj sidejoj de kulturaj asocioj. Sed evidente, kun minimumaj salajroj kaj minimumaj

elspezoj por materialoj, la rezultoj ne estas maksimumaj. De tempo al tempo venas kritikoj. Ili necesas. Sed mi petas vin: pro plendoj ne forkuru, sed provu pli intime kunlabori kun la centro, ĉar "nekonata, neamata!" En tiu ĉi senco vi ankaŭ komprenu la proponon en la estrara raporto sub punkto 2.5. Mi tre regule vizitas la centron ĉar mi certas, ke tiel mi vere kontribuas al ĝia pli bona funkcio kaj sekve al la plibonigo de FEL.

BRILAJN AGADOJN KAJ SUKCESOJN EN 1991.

I.D.

Flandra Esperanto-Ligo

vlaamse esperantobond v.z.w.

# ORGANIGRAMO

1990

*HONORA KOMITATO*

Emile Cortvriendt, Diepestraat 29, 2008 Antwerpen.
Tlf. (03) 232 44 30.
Gérard Debrouwere, Magdalenastraat 29, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 22 76 48.
Fernand Roose, Sinte-Klaradreef 59, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 34 30 61.
Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, 2180 Kalmthout.
Tlf. (03) 666 62 66.
Cesar Vanbiervliet, Oudenaardsesteenweg 158, 8500 Kortri[illegible]
Tlf. (056) 22 00 11.
Jules Verstraeten, Sint-Bernardsestwg. 1078, 2710 Hoboken.
Tlf. (03) 827 66 43.

*ESTRARO*

*Prezidanto:*
Monique Caestecker, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge.
Tlf. (091) 57 63 84.
*Sekretario:*
Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem.
Tlf. (03) 440 30 92.
*Financoj:*
Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 33 00 04.
*Instruado:*
Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem.
Tlf. (03) 239 21 69.
*Grupa agado:*
Hilde Van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst.
Tlf. (053) 70 50 11.
*Eksteraj rilatoj:*
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen.
Tlf. (011) 52 19 43.



*KOMISIITOJ*

*Financoj:*
Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.
*Eldona agado:*
Chris Declerck, Gerrit Berveling, Rejna de Jong, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.
*Manlibro de la aktivulo:*
Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee.
Tlf. (016) 20 14 53.
*Gazetara servo:*
[illegible]do Van Damme, p/a FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.
T[illegible]. (03) 234 34 00.
*Rebata servo:*
Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 70 87 00.
*Prelegvojaĝoj:*
Hilde Van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst.
Tlf. (053) 70 50 11.

*GRUPOJ - ADMINISTRANTOJ - REPREZENTANTOJ*

ANTVERPENO

**La Verda Stelo**
*Korespondadreso:*
"La Verda Stelo", Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

*[illegible]zidanto:*
[illegible]k De Weerdt, Graaf de Fienneslaan 54, 2520 Edegem.
Tlf. (03) 440 35 58.
*Sekretario:*
Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem.
Tlf. (03) 239 21 69.
*Kasisto:*
Clara Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem.
Tlf. (03) 440 30 92.
*Administrantoj de FEL:*

Dirk De Weerdt kaj Iwona Koçieba
Graaf de Fienneslaan 54, 2520 Edegem.
Tlf. (03) 440 35 58.
Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem.
Tlf. (03) 239 21 69.
Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem.
Tlf. (03) 440 30 92.

La Erikejo
*Prezidanto:*
René De Clerck, Past. Vandenhoudtstraat 13, 2080 Kapellen.
Tlf. (03) 664 39 63.
*Sekretario:*
Mireille Storms, Douglaslaan 14, 2080 Kapellen.
Tlf. (03) 666 83 19.
*Kasisto:*
Erhard Boehme, Plantinlaan 10, 2090 Stabroek.
*Administrantoj de FEL:*
Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, 2180 Kalmthout.
Tlf. (03) 666 62 66.

Mortsel
*Reprezentanto:*
Jan Bovendeerd, Meidoorn 42b, 2510 Mortsel.
Tlf. (03) 449 50 06.

Mechelen
*Reprezentanto:*
Roger Saels, Lange Zandstraat 52, 5280 Sint-Katelijne-Waver.
Tlf. (015) 31 17 90.

Schoten
*Reprezentanto:*
Edward Spitaels, Tijllaan 11, 2120 Schoten.
Tlf. (03) 658 74 20.

Turnhout
*Reprezentanto:*
Gorik Duyck-Leroy, Het Bergske 35, 2360 Oud-Turnhout.
Tlf. (014) 42 48 08.



BRABANT

Bruselo
*Prezidanto:*
Emile van Damme, Albert I straat 44, 1750 Schepdaal.
Tlf. (02) 569 17 83.
*Sekretario:*
Christiane De Vleminck, av. Brugmann 565, 1180 Bruxelles.
*Kasisto:*
Philippe Van Damme, Briljantstraat 21, 1170 Brussel.
Tlf. (02) 673 75 96.
*Administrantoj de FEL:*
Lucien De Sutter, Kersbeeklaan 90, 1190 Brussel.
Tlf. (02) 332 08 68.

Esperanto 2000
*Prezidanto:*
Carl Deseure, St.-Stefaanstraat 102, 1940 Zaventem.
Tlf. (02) 720 20 09.
*Sekretario:*
Bert Vanhoven, Boerenkrijglaan 20, 3120 Tremelo.
Tlf. (016) 53 58 92.
*Kasisto:*
André Wollants, Maleisenstraat 86, 3020 Herent.
Tlf. (016) 23 74 18.
*Administrantoj de FEL:*
Carl Deseure, St.-Stefaanstraat 102, 1940 Zaventem.
Tlf. (02) 720 20 09.

Halle
*Prezidanto:*
Jan Devillé, J. Uylenbroeckstr. 127, 1500 Halle.
Tlf. (02) 356 45 17.
*Sekretario:*
Herman Deceuninck, Villalaan 1/4, 1500 Halle.
Tlf. (02) 360 17 22.
*Kasisto:*
Jan Devillé
*Administranto de FEL:*
Jan Devillé

**Hever**
*Reprezentanto:*
Ward Schallenbergh, Jaak Lemmensstraat 4, 2970 Hever.

Schepdaal
*Reprezentanto:*
Emile van Damme, Albert I straat 44, 1750 Schepdaal.
Tlf. (02) 569 17 83.

LIMBURGO

**Limburga Esperanto-Ligo**
*Prezidanto:*
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen-Helchteren.
Tlf. (011) 52 19 43.
*Sekretario:*
Marcel Aerts, Lazarijstraat 122, 3500 Hasselt.
Tlf. (011) 25 34 67.
*Kasisto:*
Albert Claesen, Zonnebloemstraat 13, 3610 Diepenbeek.
Tlf. (011) 32 36 03.
*Administrantoj de FEL:*
Albert Claesen, Zonnebloemstraat 13, 3610 Diepenbeek.
Tlf. (011) 32 36 03.
Mathieu Habex, Gildelaan 27, 3600 Genk.
Tlf. (011) 35 95 42.
Gustaaf Rombaut, Zandhoefstraat 156, 3940 Beringen-Paal.
Tlf. (011) 42 80 20.
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen-Helchteren.
Tlf. (011) 52 19 43.

**Hasselt**
*Prezidanto:*
Marcel Aerts, Lazarijstraat 122, 3500 Hasselt.
Tlf. (011) 25 34 67.
*Sekretario:*
Albert Claesen, Zonnebloemstraat 13, 3610 Diepenbeek.
Tlf. (011) 32 36 03.
*Kasisto:*
Albert Claesen



**Genk**
*Prezidanto:*
Mathieu Habex, Gildelaan 27, 3600 Genk.
Tlf. (011) 35 95 42.
*Vicprezidanto:*
Hendrika Mandervelt, Gildelaan 27, 3600 Genk.
Tlf. (011) 35 95 42.
*Sekretario:*
Willy Minnen, Loskaaistraat 6, 3600 Genk.
Tlf. (011) 35 07 13.
*Kasisto:*
Willy Minnen.

**Beringen**
*Prezidanto:*
Jos Lemmens, Maasheidestraat 7, 3950 Beringen.
Tlf. (011) 42 26 36.
*Sekretario:*
Gustaaf Rombaut, Zandhoefstraat 156, 3940 Beringen-Paal.
Tlf. (011) 42 80 20.
*Kasisto:*
Gustaaf Rombaut.

OKCIDENT-FLANDRUJO

**Paco kaj Justeco**
*Prezidanto:*
André Dumarey, Blekerijstraat 32, 8320 Brugge-Assebroek.
Tlf. (050) 35 48 13.
*Sekretario:*
Roger Iserentant, Sint-Pieterskerklaan 59, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 31 50 64.
*Kasisto:*
Raymond Defrancq, Rietlaan 57, 8200 Brugge-St-Michiels.
Tlf. (050) 38 11 98.
*Administrantoj de FEL:*
provizore mankas

La Konkordo
*Prezidanto:*
Jan Hanssens, Meiweg 23, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 21 31 06.
*Sekretario:*
Jan Hanssens
*Kasisto:*
Danielle Sabbe-Demeyere, Winterland 23, 8710 Kortrijk-Heule.
Tlf. (056) 35 55 35.
*Administrantoj de FEL:*
Jan Hanssens, Meiweg 23, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 21 31 06.
Jean Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk.
Tlf. (056) 20 07 96.

La Konko
*Prezidanto:*
Raymond Wylleman, A. Vermeylenstraat 65, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 50 27 08).
*Sekretario:*
Thérèse Boudt-D'Hulster, Paul Michielslaan 10, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 80 06 95.
*Kasisto:*
André D'Hulster, Paul Michielslaan 10, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 80 06 95.
*Administranto de FEL:*
Raymond Wylleman, A. Vermeylenstraat 65, 8400 Oostende.
Tlf. (059) 50 27 08).

Knokke
*Prezidanto:*
Albert Marmenout, Helmweg 7, 8300 Knokke-Heist 1
Tlf. (050) 60 55 35.
*Administranto de FEL:*
Albert Marmenout

Avelgem
*Reprezentanto:*
Julien Algoet, Leynseelstraat 43, 8580 Avelgem.



Woumen
*Reprezentanto:*
Andre Gysel, Woumenweg 162, 8178 Diksmuide-Woumen.

ORIENT-FLANDRUJO

Aalst
*Prezidanto:*
Hilde Wauters, Gentsesteenweg 108, 9300 Aalst.
*Sekretario:*
Hugo Dossche, Asserendries 103, 9300 Aalst.
Tlf. (053) 70 17 89).
*Kasisto:*
Clement Amant, Brakelstraat 52, 9300 Aalst.
Tlf. (053) 21 31 56.
*Administranto de FEL:*
Hilde Wauters.

La Progreso
*Prezidanto:*
Katja Lödör, Peter Benoitlaan 117, 9219 Gentbrugge.
Tlf. (091) 30 16 77.
*Sekretario:*
Ingrid Lievens, Oude Bareelstraat 10, 9040 Oostakker.
*Kasisto:*
Rene Budts, Verpleegstersstraat 154, 9000 Gent.
Tlf. (091) 22 37 98.
*Administranto de FEL:*
Katja Lödör.

Ninove
*Reprezentanto:*
Raimond Steenhout, Pamelstraat 296, 9400 Ninove.

Sint-Niklaas
*Reprezentanto:*
Leo Corijnen, Weynstraat 1, 2700 Sint-Niklaas.
Tlf. (03) 776 33 88.

*KOOPTITAJ ADMINISTRANTOJ*

Marcel Aerts, Lazarijstraat 122, 3500 Hasselt.
Tlf. (011) 25 34 67.
Monique Caestecker, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge.
Tlf. (091) 57 63 84.
Gilbert Cardoen, Violierenlaan 5, 8670 Wervik.
Tlf. (056) 31 26 29.
Lucien De Sutter, Kersbeeklaan 90, 1190 Brussel-Vorst.
Tlf. (02) 332 08 68.
Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 33 00 04.

*ADMINISTRANTOJ-FUNKCIULOJ*

Paul Peeraerts, Baron Dhanislaan 13, 2000 Antwerpen.
Tlf. (03) 234 34 00 (dum oficejaj horoj)
Guido Van Damme, Haantjeslei 31, 2018 Antwerpen.
Tlf. (03) 234 34 00 (dum oficejaj horoj).
Jean Pierre VandenDaele, V. de Saedeleerpad 3, 8380 Lissewege.
Tlf. (050) 54 62 49.

*FLEJA*

*Prezidanto:*
André Ruysschaert, Ganzestraat 89, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 34 14 69.
*Vicprezidanto:*
Patrick Haerick, Zilverberklaan 25, 9030 Wondelgem,.
Tlf. (091) 30 51 20.
*Sekretario:*
Jean Pierre VandenDaele, V. de Saedeleerpad 3, 8380 Lissewege.
Tlf. (050) 54 62 49.
*Kasisto:*
Eddy Van den Bosch, Driegaaienstraat 37, 2700 Sint-Niklaas.
(adreso ĝis marto '91).
*FEL-administrantoj:*
Jean Pierre VandenDaele.



*Redaktoro JEN/Koncize:*
Stefaan Cottenier, Bozestraat 108, 8710 Kortrijk-Heule.
Tlf. (056) 35 33 30.
*Taskitoj:*
An Alberto, Henegouwenstraat 87/1, 9000 Gent.
Tlf. (02) 642 14 36 (dum oficejaj horoj).
Carl Deseure, St.-Stefaanstraat 102, 1940 Zaventem.
Tlf. (02) 720 20 09.
Vera Van Boxel, Langstraat 15, 2328 Meerle.
Tlf. (03) 315 83 70.
*TEJO-komitatanoj:*
André Ruysschaert, Ganzestraat 89, 8000 Brugge.
Tlf. (050) 34 14 69.
Ilse Jacques, Molenstraat 29, 2018 Antwerpen.
Tlf. (03) 237 15 67.

*KUNLABORANTAJ ASOCIOJ*

*Belga Esperantista Fervojista Asocio*
Lucien De Sutter, Kersbeeklaan 90, 1190 Brussel.
Tlf. (02) 332 08 68.
*Belga Ligo de Katolikaj Esperantistoj*
Hubert Audenaert, Beekstraat 6, 9100 Lokeren.
Tlf. (091) 48 44 56.
*Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj*
Marc Demonty, Schoolstraat 3, 1710 Dilbeek.
Tlf. (provizore) (02) 520 19 44.

*Esperanto-Centrum Nederland*
ECN, Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag, Nederlando.
Tlf. 00 31 (70) 55 66 77.

*Association pour l'Espéranto (APE)*
Prezidanto: Georges Sossois
79 rue du Basson, 6001 Marcinelle. Tlf. (071) 43 62 05.
Sekretario: Simonne Fichefet
rue Destrée 104, 6210 Charleroi. Tlf. (071) 35 46 87.
Kasisto: Marcel Delforge

*Belga Esperanto-Federacio (BEF)*
Prezidanto: Georges Sossois
Vicprezidanto: Monique Caestecker
Sekretario: Philippe Van Damme
Kasisto: Marcel Delforge

*Korespondadreso APE/BEF*
Marcel Delforge, 16 rue des Glacières, 6001 Marcinelle.
Tlf. (071) 43 14 13.

*Informoj pri planataj aktivecoj sendu al*
Philippe Van Damme, Briljantstraat 21, 1170 Brussel.
Tlf. (02) 673 75 96.